

La Riverego

MSF en Montrealo	2	PU : Montreala dimensio	14
Lingvemuloj venas al Montrealo	4	Amikeco Norde-Sude	18
Presu viajn informilojn	7	Serio : fundamentaj vortoj	24
MeKaRo en Granbio	8	AMU Poznanon daŭras	25
Paralela universo	10	Kial ne internacia skribo	26



Amikeco Norde-Sude
Amitié nord-sud

Monda socia forumo en Montrealo

Normand Fleury

Organisé pour la première fois dans l'hémisphère nord, le Forum social mondial s'est tenu cet été à Montréal. Regroupement d'organisations atermondialistes, ce Forum est un lieu parfait pour diffuser de l'information sur l'espéranto. Nous y étions, participant à la parade d'ouverture, tenant un kiosque pendant trois jours et lors de deux conférences.

Komence de aŭgusto 2016, la unuan fojon en la norda hemisfero, okazis la 12a Monda Socia Forumo (MSF). La MSF estiĝis en Porto Alegre, Brazilo, en 2001, kaj ĝis nun ĝi okazis en Brazilo, Barato, Venezuelo, Kenjo, Senegalio kaj Tunizio. La MSF estas evento, en kiu la alimondistoj kunordigas kampanjojn kaj informas unu la alian pri la alimondistaj movadoj en la diversaj mondopartoj. En Montrealo partoprenis ĉirkaŭ 15 mil personoj el pli ol 100 landoj.

Ĉu tio estis bona medio por varbi pri Esperanto? Kompreneble! Fakte, eĉ bonega medio! Nia teamo aktive partoprenis, unue, en la marŝado



por la Tero kun granda banderolo. Poste ni starigis budon dum tri plenaj tagoj kaj ni ankaŭ havis la okazon prelegi dufoje pri nia Movado, france kaj angle. Ni disdonis pli ol mil informilojn (angle kaj france): estis belaj poŝkalendaretoj kaj paĝmarkiloj kun la nomoj kaj la informoj pri la Universala Esperanto-Asocio, Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo Kebekia. Danke al nia talenta teamo, ni povis varbi france, angle, hispane, portugale kaj eĉ japane. Multaj forumantoj miris, ke ni povas respondi plurlingve, ĉar en pluraj budoj nur la angla estis uzata. La tri oficialaj lingvoj de la forumo estis la franca, angla

kaj hispana, sed krom la presita programo, kiu estis trilingva, okazis interpretado nur dum ĉefaj prelegoj. Ne eblis pagi por interpretado dum la pli ol 1200 programeroj, kiuj okazis dum la forumo...

Jes ja valoris partopreni, ĉar multaj forumantoj menciis al ni, ke ili ja




intencas tuj eklerni Esperanton pere de Lernu.net.

Ni dankas al Kanada Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Societo Kebekia, kiuj finance apogis nian partoprenon en MSF, kaj al UEA, kiu morale subtenis nin en tiu iniciato.

Espéranto : une langue neutre et équitable

Spektu [mallongan videon](#) pri Esperanto de TFO (Franca Televido de Ontario) kun Geoffrey Greatrex, estrarano de KEA kaj de ESF, kaj legu la akompanantan artikoleon

Connaissez-vous l'espéranto ? L'espéranto est une langue parlée par plus de deux millions de personnes à travers plus de 100 pays dans le monde. Elle n'est la langue officielle d'aucun pays, mais se veut une langue neutre qui permet à tous, peu importe leur nationalité, de se parler et de se comprendre. À l'oreille, l'espéranto peut sonner comme de l'espagnol ou de l'italien. Selon ses adeptes, c'est une langue internationale qui est facile à apprendre et qui vous permettra de rencontrer de nouvelles personnes dans d'autres pays. Une belle découverte !



<http://www.tfo.org/fr/univers/tfo-247/100463809/esperanto-une-langue-neutre-et-equitable>

Lingvemuloj venas al Montrealo !



Nicolas Viau

Le Symposium nord-américain des polyglottes, événement ouvert à tous les amoureux des langues, a eu lieu à l'Université Concordia les 23 et 24 juillet 2016. Nicolas Viau, membre du comité organisateur et présentateur (sur l'espéranto !), nous raconte son expérience.

Une première à Montréal — et ce n'est qu'un début !

Evento por lingvemuloj

La 23an kaj 24an de julio okazis la Nordamerika Plurlingvula (foje « Poliglota ») Simpozio (North American Polyglot Symposium, aŭ NAPS) ĉe Universitato Concordia, en Montrealo, nova serio de eventoj (simile al la Polyglot Gathering kaj la Polyglot Conference) por plurlingvuloj kaj lingvemuloj ĝenerale. Pli ol dudeko da internaciaj prelegantoj, inter kiuj Benny Lewis, Steve Kaufman, Olly Richards, Simon Ager kaj pluraj aliaj, venis prelegi kaj sociumi kun la lingvemularo.

Aldone al mia partopreno en la organiza teamo de la evento, mi mem havis la okazon prelegi pri nia internacia lingvo. Estis tre interesa sperto, kaj mi esperas, ke la lingvo kaj ĝia mondo ŝajnis al la partoprenantaro allogaj. Mi parolis pri la origino kaj celoj de la lingvo, ĝia baza strukturo kaj

kulturo. Mi ankaŭ parolis pri mia persona sperto : la kialoj, pro kiuj mi eklernis Esperanton kaj, plej grave, la kialoj, pro kiuj mi daŭre uzas la lingvon kaj partoprenas niajn rondojn. Mia prelego estis unu el malmultaj, kiuj estis en la franca lingvo, do, estis bona okazo por pluraj praktike « plurlingvumi ». Tio bone funkciis, ĉar la franca estas vaste konata de nordamerikaj plurlingvuloj, kiel mi konstatis.

Poste mi havis la plezuron helpi Suzanon (Suzanne) Roy, de Tririvero, kiu gvidis posttagmezan atelieron pri Esperanto dum preskaŭ horo — nur en Esperanto — danke al sia sperto en la gvidado de kursoj por komencantoj. La celo estis prezenti Esperanton al homoj, kiuj plejparte havas neniun konon pri la lingvo. La partoprenantaro rapide akiris scipovon pri O-

vortoj, A-vortoj, I-vortoj, pronomoj, kaj baza vortprovizo. Ili povis senti la logikon de la lingvo kaj eĉ krei siajn unuajn frazojn en ĝi ! Krome, la sperto kompreni prelegon nur per (preskaŭ) nekonata lingvo helpas la lernantojn forte fidi je siaj lernokapabloj kaj, espereble, plu lernemi.

Mi, bedaŭrinde, ne povis partopreni ĉiujn programerojn, sed mi, interalie, ĝojis ĉeesti prelegon pri la nuna stato de la franca lingvo en Kebekio kaj monde (tra iom humurstila prelego),

lerni bazajn konceptojn pri la kreola lingvo

papiamento, kaj aŭskulti pri la revivigo de la skotgaela lingvo. Oni ankaŭ havis la okazon lerni, kiel plibonigi sian lernokapablon de aliaj lingvoj, ekzemple, helpe de iloj kaj konsiloj de Steve Kaufman, Benny Lewis (konata kiel « La Irlanda Plurlingvulo » — li scipovas

paroli ankaŭ Esperanton), aŭ Olly Richards, aŭ pri manieroj eduki siajn gefilojn plurlingve (Tetsu Yung, kunorganizanto kaj preleganto, faras tion en kvin lingvoj !), lerni trukojn el lingvistiko por ŝajngi altan lingvoscipovon, kaj multe pli.



Bunta partoprenantaro en bunta urbo

Multaj partoprenantoj venis de ekster Montrealo kaj Kanado. Venis, kompreneble, pluraj Usonanoj, sed ne nur ! Ankaŭ multaj Eŭropanoj malkovris Montrealon (pluraj, unuafoje !). La partoprenantaro tute konsentis pri la taŭgeco de Montrealo por tia evento, pro sia multkultura laĵ multlingva loĝantaro (ja aŭdeblas multegaj lingvoj en diversaj kvartaloj). Eĉ pli grava, laŭ mi, estas la fakto, ke Kebekio estas la sola loko en

Nordameriko, kie la franca estas komuna lingvo, kaj kie lingvaj demandoj estas grava parto de la ĉiutaga vivo. Lingvodiverseco en Montrealo do sufiĉe malsamas ol la lingvodiverseco de aliaj urbegoj de Nordameriko.

Tiu malkovro de la urbo inkluzivis ankaŭ viziton de la Reĝa Monto (kia

aventuro — pluvegis, tagfine !), kunmanĝoj en diversaj restoracioj, ktp. Fruaj alvenantoj ankaŭ vizitis la urbocentron kun organizantoj, unu tagon antaŭ la oficiala komenco. Turismo, lingvoj, novaj amikoj... kion pli oni povus deziri ?

Estas nur komenco !

NAPS estis la unua evento el nova serio de lingvotemaj renkontiĝoj. Oni planas baldaŭ reorganizi ĝin uzante iom ŝanĝitan formaton venontjare, en Montrealo, inter la 25a kaj 27a de aŭgusto 2017. Montrealo do ankoraŭ restos grava centro por plurlingvuloj — kaj tio, laŭ mi, tute taŭgas. Certe, ĉiuj interesataj Esperantoparolantoj devus partopreni. Fakte, rimarkindas, ke Esperanto estas pli kaj pli konata en tiuj lingvemaj rondoj, kaj mi renkontis plurajn homojn, foje ne kutimajn partoprenantojn de Esperanto-renkontiĝoj, kiuj aŭ freŝdate eklernis ĝin, aŭ ŝatus almenaŭ provi. Tio, eble, okazas danke al Duolingo, sufiĉe disvastigita lingvolernada platformo (almenaŭ en anglalingvujo), kie antaŭ jaro aperis kurso de



Esperanto por anglaparolantoj. Pli ol 400 000 homoj jam aliĝis ! Gravas ankaŭ la fakto, ke unu el la plej konataj kaj plej fruaj « plurlingvulaj »

eventoj, la Polyglot Gathering, estas organizata de Esperantistoj (Judith Meyer kaj Chuck Smith), kaj ĝi iel sekvas la modelon de Esperanto-aranĝoj.

Emfazindas, ke, kvankam la nomo de la evento uzas la vorton « plurlingvula », tute ne necesas paroli multajn lingvojn por partopreni tian eventon. Ĉiuj lingvemuloj kaj plurlingvul(et)ojn estas bonvenaj !

Do, ĝis baldaŭ en multlingvujo !

Spektu la prelegojn de la evento ĉe YouTube : <https://www.youtube.com/channel/UCSx05cu85OquF54SMefjP8A>

Esperantistoj — ĉu novaj « bestoj » en Granbio ?

Nicolas Viau

Nicolas Viau nous écrit quelques mots sur le 12e MeKaRo, le premier à avoir eu lieu dans la ville de Granby — un nouveau centre de l'espérantophonie québécoise ?

Oni povus foje imagi, ke jam okazis MeKaRo — la Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto — en preskaŭ ĉiuj interesaj urboj de Kebekio kaj Ontario... Sed Granbio nun estas nun nova centr(et)o de Esperantujo inter Montrealo kaj Ŝerbruko, ekde la translokiĝo de Normando kaj Zdravka tien.

Eble estas nun nova oportuno, por ke sekvantaj MeKaRoj povu okazi ankaŭ en relative pli malgrandaj urboj. Tamen estis multe por fari en Granbio. Bestĝardeno, naturcentro, pomvinejo (mi partoprenis, kaj estis tre interese — kaj

bonguste !) kaj farmbieno estas ĉiuj viziteblaj en proksimaj lokoj.

Sabate ni marŝadis tra tipa urbo de la Orientaj Kantonoj, kun anglaj komencoj kaj frua arkitekturo, sed franclingva plimulto hodiaŭ.

Normando kaj Zdravka dankendas pro sia tre afabla gastemo. Sabatvespere ili preparis manĝegon por la tuta partoprenantaro kaj

eĉ gastigis kelkajn (ekzemple, min !), antaŭ tre agraba vespero en la ĝardeno.

Dimanĉe ni pasigis sufiĉe longan tempon en la



fama Granbia bestĝardeno, eble, la plej konata loko en Granbio. Estas en ĝi tre multaj diversaj bestoj... sed tiun tagon ili gastigis novan specion : Esperantistojn !

Poste kelkaj iris al naturcentro, kaj aliaj, inkluzive de mi, al pomvinejo, kie ni gustumis tre diversajn pomvinojn !

Tagfine ĉiuj manĝis en restoracio apud lago.

Lundon matene la grupo dividiĝis inter tiuj, kiuj vizitis la Farmbienon Miner, malnova farmbieno, kie oni kreskigas fruktojn kaj legomojn laŭ tradiciaj metodoj. Aliuloj povis iri golfi — flugtelere ! Ĉio tio estis antaŭ kuna manĝo en ĉina bufedrestoracio.

Eĉ aperis artikolo pri MeKaRo en loka gazeto (sur la unua paĝo !) semajnon poste. Granbio nun estas parto de Esperantujo !



MeKaRo-2017 en Hamiltono !

Mateo Chisholm

Esperanto-Toronto invitas vin al la venonta Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo), kiu okazos en Hamiltono, Ontario, de la 20a ĝis la 22a de majo 2017.

MeKaRo estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare en amikeca etoso, alterne en Ontario kaj en Kebekio, dum la longa semajnfino en majo (t.e., la semajnfino de la Viktorina Tago en Ontario kaj de la Nacia Tago de la Patriotoj en Kebekio). Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboĵoj en Ontario kaj Kebekio.

Hamiltono estas urbo plena je kulturo, historio, kaj naturo. Situanta en suda Ontario, je malpli ol unuhora veturo de Toronto aŭ de la Niagara Akvofalaro, Hamiltono estas perfekta vizitloko. De ĝia vigla arta vivo, al ĝia riĉa historio, al ĝiaj nekredeblaj plenaeraj allogaĵoj, ĝi okazas tie ! Pliaj informoj aperos ĉe mekaro.ca.



Paralela universo kaj ĝiaj mikroversoj

Jed Meltzer

Univers parallèle a été mis sur pied cette année pour permettre à des espérantistes isolés en Amérique du Nord — en particulier les milliers qui ont appris grâce à Duolingo — de tenir simultanément des rencontres espérantistes près de chez eux. En tout, 25 événements, regroupant de 3 à 28 personnes, ont eu lieu dans quatre pays (Canada, États-Unis, Mexique et Cuba) ainsi que... sur un bateau de croisière.

La 20an de aŭgusto pli ol 210 homoj en kvar landoj de Nord-Ameriko partoprenis 25 malsamajn Esperanto-renkontiĝojn samtempe, kadre de nova eventaro sub la titolo Paralela Universo. La aranĝoj variis laŭ grando kaj komplekseco, de 3 ĝis 28 homoj.

Multaj el la partoprenantoj estis relative novaj, kaj en pluraj eventoj la plejmulto de la ĉeestantaro renkontis aliajn esperantistojn la unuan fojon en la vivo ! Tiu ĉi eventaro estis organizita sufiĉe subite, kun nur naŭ semajnoj inter la unua enreta mencio kaj la eventaro mem. Dum la tago, partoprenantoj de diversaj eventoj interkomunikis kaj kunhavigis fotojn kaj videojn de sia agado.

Nu, nun vi scias, kio estis Paralela Universo. Mi volas ĉi tie rakonti al vi, kial kaj kiel la afero

efektiviĝis.

Nord-Ameriko povas esti malfacila loĝloko por Esperantisto. Ni rigardas envie al la bunteco de Esperantaj aranĝoj en Eŭropo, kie la multlingveco levas la lingvan problemon pli alte en la socian konscion. Tie ĉi la distancoj estas longaj kaj, se ne ekzistas forta loka klubo, multaj esperantistoj tre malofte havas la okazon ĝui la etoson de Esperanta aranĝo, aŭ eĉ paroli la lingvon vizaĝ-al-vizaĝe.

Aparte lamentinda estas tiu stato, kiam en nia kontinento aperas nova ondo de lernantoj dank' al la furora programaro Duolingo. Pli ol 500 000 homoj nun registris sin kiel lernantojn de Esperanto ĉe tiu programaro, kaj ĉiutage 30 homoj finas la bazan kurson. Ĉar la kurso uzas la

anglan lingvon, tre granda proporcio de tiuj lernantoj loĝas en Nord-Ameriko.

Do kiel kapti tiun ondon, kaj enkonduki la novulojn en nian komunumon antaŭ ol ili perdos intereson ? Tio estis la defio, kiun mi rigardis, kiam oni petis min fariĝi la kunordiganto de junula agado de Kanada Esperanto-Asocio (KEA). La instigo al la kreo de tiu posteno estis mia propono, ke Toronto gastigu IJK-on en 2019, se Montrealo gastigos la UK-on. Por fari tion ni devos unue revigligi nian junularan sektion Junularo Esperantista Kanada (JEK) !

Mi akceptis la ŝarĝon hezite, ĉar mi ne plu estas junulo, sed ne estis memevidenta kandidato de la ĝusta aĝo, do mi akceptis kun la penso, ke mia unua tasko estos trovi mian posteulon ! Do, kiel allogi agemajn junulojn ? Aŭ agemigi la jam allogitajn ? Ĉar tro malfacilas junigi la jam agemajn allogitajn, tiuj restis la solaj ebloj. Ĉe MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)



Partoprenantoj en Meksiko

en majo 2016 mi multe diskutis la aferon kun miaj geamikoj.

Nu, junuloj lastatempe tre ŝatas teknologion, saĝtelefonojn, sociajn retojn kaj tiel plu. Tiuj iloj vere kunportis Esperanton al nova generacio, sed multaj el tiu generacio tute maltrafis la spertojn, kiujn ni, maljunuloj, ĝuis dum niaj fruaj jaroj de Esperanta agado. La raraj kaj karaj renkontiĝoj ! Multaj el ni memoras pasigi horojn por ĉeesti renkontiĝon, aŭ flugi al alia lando, aŭ eĉ telefoni al nekonato, simple ĉar tiu enlistiĝis en la membroliston de nia landa asocio kaj loĝas ne tro malproksime.

Kiel rekapti tiun sperton por la aktuala junularo ? Ĉu vere estas fendo inter la malnova versio de Esperantujo kaj la nova interreta versio ? Aŭ ĉu povas ekzisti ponto inter la du mondoj ? Dum MeKaRo ni pasigis kelkajn horojn piedirante tra la urbo Granbio serĉante « portalojn » por la ludo Ingress, pri kiu unu amikino estas entuziasmo. (Ĝi similas al

Pokémon Go, kiu tiam ankoraŭ ne aperis.) Ŝi parolis multe pri tio, kiel la saĝtelefona teknologio havas la efikon instigi homojn iri eksteren kaj vidi la veran mondon, kaj renkonti homojn vizaĝ-al-vizaĝe. Mi miris, kiel multe ni malkovris pri la urbo Granbio kaj pri la fizika mondo ĉirkaŭ ni, helpate de tiuj iloj, ne flankdistrite de ili, kiel mi antaŭsupozis.

Tiel ekflamis la ideo. Ni povus uzi la povon de la nova teknologio por instigi homojn renkonti aliajn homojn en la vera mondo. La ideo pli kaj pli firmiĝis. Ni havos plurajn eventojn la saman tagon. Ĉiun eventon organizos lokano, kaj ni klopodos provizi simplan ŝablonon por la eventoj. Ni decidis, ke kvar horoj estus la ideala maksimuma vojaĝ-distanco. Tiel oni povus vojaĝi matene, komenci je tagmezo, kaj fini je 20:00 kaj ankoraŭ reiri hejmen sen bezono tranokti. Ni sugestis, ke evento inkluzivu tagmanĝon kaj vespermanĝon, kun aliaj agadoj intertempe.

Ni emfazis, ke fakte estas tre facile organizi eventon — nur sugestu restoraciojn por la du manĝoj, kaj agadon inter la du. La agadoj estis kutimaj por Esperanto-aranĝoj — muzeoj, naturpromenadoj, keglo-ludado, serĉludoj, ktp. Kelkaj eventoj estis tre detale organizitaj, kaj kelkaj estis neformalaj kaj malpli longaj, ol la sugestitaj ok

horoj. Do, ŝajne, la ŝablono estas sufiĉe fleksebla por taŭgi por la diversaj bezonoj de eventoj en diversaj lokoj.

Komencite, la afero rapide kreskis. Ni volis uzi jam pretan teknologion, ĉar mankis tempo kaj sperto por krei novajn ilojn. Do, ni ĉefe uzis Google-grupon kaj Facebook-on. Plej grava estis la mapo farita per Google Maps, per kiu ni povis montri la lokojn de la proponitaj eventoj kun ligiloj al la diskutfadenoj. Por komuniki dum la eventoj mem ni elektis la programon Telegram — rapida mesaĝilo, kiu funkcias per saĝtelefonoj kaj komputiloj, kaj per kiu oni povas facile kunhavigi fotojn, videojn, geografiajn lokojn, ktp.

Kompreneble, ne ĉio iris perfekte. Okazis problemoj de trafiko, pluvo, varmeco, kiuj malhelpis kelkajn partoprenantojn. Sed finfine la eventaro estis pli sukcesa, ol ni atendis. El la 28 anoncitaj eventoj, 25 vere okazis, kaj kelkaj el la eventoj estis mirige grandaj, inkluzive de novaj vizaĝoj kaj malnovaj ne viditaj dumlonge. Spertuloj multe komentis pri la surprize alta parolkapablo de la novuloj, kiu evidentigas kaj la facilecon de nia lingvo kaj la efikecon de novaj lernorimedoj.

Mi aparte ŝatas la rakonton pri la plej malgranda

evento, en kiu la organizanto unuafoje parolis Esperanton kun alia homo — kaj tiu alia homo eklernis ĝin antaŭ 51 jaroj. Tio estas precize la sperto, kiun ni celis krei per Paralela Universo. Ni esperas, ke tiu ĉi eventaro povos esti unu plia ilo en nia il-skatolo por vigligi la Esperantan movadon en Nord-Ameriko kaj pretere. Venontjare ni klopodos kreskigi la eventon ankaŭ en Sud-Ameriko, kaj eventuale en aliaj kontinentoj, se estas intereso. Mi esperas vidi vin ĉe Paralela Universo 2017 !

Partoprenintoj laŭ lando kaj grandeco:

- **Kanado:** Toronto ON (11), Montréal QC (8), Victoria BC (5), Saguenay QC (4), London ON (4)
- **Usono:** San Francisco CA (28), Washington DC (21), Austin TX (15), Mount Laurel NJ (15), New York NY (13), Watkins Glen NY (12), Kansas City MO (8), Seattle WA (8), Boston MA (8), San Diego CA (7), Atlanta GA (6), Chicago IL (5), Raleigh NC (4), Phoenix AZ (4), Pompano Beach FL (3), Cincinnati OH (2)
- **Kubo:** La Habana (19), Viñales, Pinar del Río (3)
- **Meksiko:** Santiago de Querétaro (14)
- Kaj surmare sur la krosŝipo Celebrity Solstice (3, Esperantista familio)
- **Sume: 231**

Konkurso: Internacie Kontribui

Se vi parolas en Esperanto kaj loĝas ekster Eŭropo, vi rajtas partopreni en la verkokonkurso KIK2 (Konkurso: Internacie Kontribui, <http://KIK2.org>). La intenco de la konkurso estas plibuntigi kaj variigi la kontribuanton al la internaciaj Esperantaj revuoj, kaj tiel doni al la lingvo kaj la komunumo pli da valoro, ĉarmo kaj utileco, kaj evoluigi la kulturon de Esperanto.

La karakterizaĵoj de KIK2 :

- Granda premio (maksimume 200 000 enoj : pli ol 2500 CAD)
- Unika kaj justa sistemo
- Ne estas aĝlimo por partopreni
- Ĉiuj sukcesintoj ricevas premion

La baza strukturo de KIK2 estas tia : oni gajnas unu poenton kontraŭ sia kontribuaĵo aperinta en la specifaj internaciaj revuoj difinitaj de la organizanto ; poste oni dividas la premion laŭ gajnitaj poentoj.

Por partopreni en la konkurso oni devas unue registriĝi. Vidu la sekcion « Kion fari por partopreni en KIK2 ? » ĉe <http://kik2.org/odr/>.

Paralela Universo : la Montreala dimensio !

Steven Horváth

Huit espérantistes, dont seulement deux habitués des rencontres bimensuelles, se sont réunis à Montréal dans le cadre de l'évènement Univers Parallèle. Après un pique-nique et une balade au Parc Jarry, ils ont soupé dans une pizzeria du voisinage.

Paralela Universo estas evento, kiu okazis la 24an de aŭgusto en 25 diversaj lokoj en kvar landoj en Nord-Ameriko (Kanado, Usono, Meksikio kaj Kubo) kun pli ol 200 partoprenantoj.

La celo de Paralela Universo estas fortigi la Esperantan Movadon en Nord-Ameriko, ebligante al kiom ajn multaj homoj en Nord-Ameriko esti malpli ol kvar horojn for per aŭto de iu el la eventoj. La plejparto de la eventoj havis la saman formaton, en kiu matene oni veturis ĝis la renkontiĝa loko, kaj poste oni kuntagmanĝis, ekskursis, kaj fine vespermanĝis.

Antaŭ kelkaj monatoj, kiam la ideo organizi Paralelan Universon surfaciĝis ĉe Jed Meltzer, mi pensis, ke ĝi estas bona ideo, kaj mi indikis mian intereson. Mateo Chisholm poste demandis, ĉu mi povus organizi ĝin por mia hejmurbo, Montrealo.

Post heziteto, mi konsentis, ĉar mi pensis, ke ĝi povus esti mia kontribuo al la Esperanta Movado. Baldaŭ Facebook-grupoj ekaperis kaj organizantoj el diversaj lokoj ekanoncis sian intencon partopreni la unuan Paralelan Universon.




La Montreala Paralela Universo ekis kun pikniko en Parko Jarry. Originale estis planite poste kegladi kaj fini la eventon per vespermanĝo en la restoracio *Les Faubourgs*, sed planoj povas ŝanĝiĝi (kaj tiel okazis !).

Paralela Universo ne povis okazi dum pli bela tago ! La suno brilis, kaj la vetero ne estis tro varma aŭ malvarma. La Montrealan Paralelan Universon partoprenis ok personoj entute. La mirinda afero estis, ke nur du el la ok estis kutimuloj inter Montrealaj esperantistoj. Krom la tri montrealaj esperantistoj, kiuj ne ĉeestis en regulaj ESK-eventoj, estis du esperantistoj el Kebeko kaj unu el Otavo. Estis nekredeble havi novulojn kaj esperantistojn el ĉirkaŭaj regionoj inter ni !

Pro la bona kaj bela vetero, anstataŭ vojaĝi tra la urbo al la kegladejo, ni restis en la parko, kie ne piknikis. Ni ĉirkaŭmarŝis la vivoplenan parkegon kaj vidis akvofontanojn en la lageto, infanojn en la naĝejo, kaj eĉ povis aŭdi la finon de futbala matĉo en la Uniprix-futbalejo apud la parko. Ni finis la Paralelan Universon kun pica vespermanĝo en loka picejo. Paralela Universo estis granda sperto, kaj ĝi sukcese fortigis la Esperantan Movadon ne nur en Montrealo, sed aliloke en Nord-Ameriko.

Artikolo pri Esperanto en *Time*

Legu bonan artikolon pri Esperanto en fama usona revuo, *Time* (angle)



TIME SIGN IN | SUBSCRIBE

HISTORY LANGUAGE


The Serious History Behind Esperanto

Olivia B. Waxman @OBWax | July 26, 2016

The first Esperanto textbook was published on July 26, 1887, by its inventor L.L. Zamenhof

Over 1,000 speakers of Esperanto have been expected to gather this week at the 101st World Esperanto Congress in Slovakia to celebrate Tuesday as the 129th anniversary of the “birth” of the language, as July 26, 1887, marked the publication of the first Esperanto textbook by L.L. Zamenhof. The Polish doctor created the language, which is essentially a set of roots that can be turned into words with certain endings that create different parts of speech.

Though Esperanto can be seen as something of a punchline today, its origins can be found in serious world-historical matters.



Esperanto creator L.L. Zamenhof. Getty Images

Zamenhof identified the need for a “neutral tongue,” as TIME once called it, while growing up in Bialystok in northeastern Poland, home of a mostly Jewish population and a few main ethnic groups that were not communicating. Humphrey Tonkin, the former president of the University of Hartford and the

time.com/4417809/esperanto-history-invention/

Louis FRÉCHETTE

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA
ISBN 978-2-9806246-4-3

Kristnaskaj rakontoj :

Papere aŭ elektronike !

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis FRÉCHETTE](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento.

130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson COBURN](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon Esperanto-Societo Kebekia en 2013.

« [...] la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchette idealan donacon — ne nur kristnaskan — al ĉiunivelaj esperantistoj. » (Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014). [Legu pli.](#)

« Aventuro, pioniroj, neĝoŝtormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama : jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuindaj kaj engaĝaj. » (Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015). [Legu pli.](#)

Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon alklakante
[ĉi tie.](#)

Papera eldono 24 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj, elektronika eldono 14 CAD.



Nova kaj plibonigita Lernu.net

La teamo de lernu.net ĝojas anonci la plenan relanĉon de la paĝaro. La nova lernu.net enhavas novan interesan kurson de Esperanto kun centoj da ekzercoj, ilustraĵoj kaj granda serĉebla biblioteko. La retejo estas plene modernigita kaj funkcias kun novaj retumiloj kaj retaj teknologioj, kiuj ne ekzistis, kiam la antaŭa versio de la paĝaro estis lanĉita.

La plena 26-leciona kurso de la nova paĝaro estas bazita je rakonto de konata verkisto Anna Löwenstein, kun ekzercoj de edukisto Birke Dockhorn. La kurso havas abundajn ekzercojn, ilustraĵojn, kaj sonojn, kaj sekvas la gvidliniojn de KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) pri lingvolernado. La nova paĝaro ankaŭ enhavas detalan gramatikon de Esperanto kaj referitajn foruman sistemon, vortarojn, kaj tradukilon. La teamo daŭre aldonas novajn materialojn kaj

funkciojn al la nova paĝaro, do revizitu ĝin ofte por vidi la ŝanĝojn kaj plibonigojn !

Lernu.net ekestis kaj ekzistas dank' al malavara subteno de ESF, kiu, siavice, ekzistas dank' al malavara subteno de ESF-subtenantoj, al kiuj ni aparte dankas. Kiel skribis Fernando Maia Jr., Brazilo, « Mi donacas al ESF, ĉar mi konsentas kaj

fidas je la realigata laboro. ESF tenas kaj subtenas kelkajn el la plej gravaj spacoj por Esperanto en la reto, ĉiam kun moderna rigardo kaj entuziasmigaj rezultoj. » Ni petas vin konsideri fari donacon al ESF/Lernu ĉi-jare :

esperantic.org/donations (eblas donaci unufoje aŭ ĉiumonate). Eblas ankaŭ donaci per UEA-konto : esfo-p aŭ per ĉeko : Esperantic Studies Foundation, COP Ste-Catherine, CP 60502, Montréal QC H1V 3T8, Canada.

[laŭ Esperantic.org]



Amikeco Norde-Sude

Zdravka Metz

Zdravka Metz et Normand Fleury ont passé deux semaines inoubliables au Costa-Rica, chez des amis costaricains espérantistes. Deux semaines remplies de rencontres, de contacts avec une nature foisonnante, d'expériences culinaires diverses...

Normando, el Kebekio, kaj Guido, el Kostariko, konatiĝis en Kubo dum la 7a TAKE en 2004 (Tut-Amerika Kongreso de Esperanto), kaj, kiam la filo de Guido, Andrés, ricevis la okazon studi dum unu jaro en Montrealo en 2011,

Guido skribis al Normando :
« Ĉu vi povus trovi ĉambron por nia filo ? » Normando tuje respondis :

« Kompreneble, eĉ en nia domo, se li volus resti ĉe ni ! »

« Tiel Normando fariĝis mia kanada patro », ridetas

Andrés, kiam li memoras pri tiu jaro en Montrealo.

Ekde lia foriro en 2012, la familio Hernández-Pridybailo invitis nin iam viziti Kostarikon. Jen, ni

ĵus pasigis du neforgeseblajn semajnojn en Kostariko.

La nomo de la lando signifas « riĉa bordo ». Jes, ĝi estas riĉega je natura diverseco, paradizo por 900

specioj de birdoj, multnombraj viziteblaj vulkanoj, tropikaj arbaroj kun kvalitaj lignoj kiel la malmola *granda tektono* (lat. *tectona grandis*) kaj mola ligno — loke nomata *poĉote* (lat. *pachira quinata*) —, kiu havas kolorojn ruĝan, oranĝan kaj flavan. La lando estas riĉa ankaŭ je homoj. Pli ol 4,5

milionoj da loĝantoj — origine aŭtoĥtonoj, poste hispandevenaj, de Karibaj insuloj kaj de Azio.

La familio Hernández-Pridybailo loĝas en San José, la ĉefurbo. La patrino de Andrés nomiĝas



Galina kaj estas el Belorusio, el Minsko. Juna Guido iris studi mekanikan inĝenieradon en Sovetunio en 1971, sed unue li devis lerni la rusan en Moskvo. Jaron poste, Guido komencis sian fakan studadon en Minsko. Galina studis por esti inĝenierino pri metalurgio, kaj ili konatiĝis kiel studentoj kaj geedziĝis en Minsko en 1980, kiam ili jam ricevis siajn inĝenierajn diplomojn.

Iliaj filoj Antonio kaj Andrés naskiĝis en Kostariko, ĉar la juna paro trovis laboron kiel profesoroj ĉe Instituto pri teknologio en Kostariko. Guido nun jam emeritiĝis, sed Galina ankoraŭ laboras kiel estrino pri scienco kaj inĝenierado pri materialoj ĉe la sama instituto.

Andrés konis nian deziron vidi kaj sperti la kostarikan ĉiutagan vivon. Do, eĉ veturante hejmen de la flughaveno, li montris al ni la urbocentron, sian universitaton, belan sunsubiron. En sabato matene li volontulis.



Andrés studis agrikulturon kaj daŭre ĉeestas kursojn kaj esploras en tiu fako. Lia celo estas doktoriĝi pri agrikulturo, ĉar Kostariko havas bonajn kondiĉojn en agrikulturo, havante eĉ du rikoltojn jare. Por socie helpi kaj por havi la sperton, sabate matene Andrés respondecas pri eksperimenta urba ĝardenado en kvartala

komunuma centro. Ni ĉeestis, kaj vere interesis nin, kiel ĝardeni en plastaj reciklitaj frukto-kestoj, ĉiam pliriĉigante la grundon per molaso, maiza faruno kaj simpla arbara grundo por stimuli bakterian vivon.

Kun Andrés ni ekskursis sur unu el multnombraj vulkanoj, nomata Irazú. Ĝi estas atingebla aŭte preskaŭ ĝis la pinto de 3432 m. Tiun dimanĉon

estis iom nube super la vulkano, sed, dum ni promenis en tiu vulkana parko, la nuboj foriris, kaj ni povis vidi la profundon de la kratero. Nun, dum la seka sezono, ĝi estas nigra pro vulkanaj ŝtonetoj kaj lafo. Sed Andrés vidis ĝin iam en pluva sezono ; tiam la kratero fariĝas lago verdkolora.

Kostariko estas malgranda lando, sed la vojoj ofte serpentas tra la montoj, kaj tiel vojaĝado postulas tempon. Guido kiel emeritulo ofte restas ĉe familia somera domo en la regiono Guanacaste, pli precize Barco Quebrado. La vilaĝo troviĝas proksime de Pacifiko, kaj la klimato estas pli varma kaj seka. Guido invitis nin viziti la regionon dum kelkaj tagoj.

Kiam nia aŭtobuso atingis la vilaĝon, Guido jam atendis nin ĉe busa haltejo, surhavante grandan ĉapelon. Jes, nepre oni devas protekti sin dum tagmezaj horoj. Ni marŝis kun li ĝis « Calle Esperanto », la strato, kies nomon li elektis. Fakte, ilia strato ne havis nomon, sed li instalas ŝildon kun tiu nomo ĉe ĝia komenco, tiel ke nun ĉiuj konas la straton kiel la straton Esperanto.

Guido gastigas Luís-on, ligno-skulptiston, en ilia somera domo. Kiam neniu el ili povas veni, Luís, loĝante tie, samtempe gardas la domon. Luís faras tradiciajn maskojn el simplaj ligno-bretoj el mola ligno « poĉote » kaj poste donas la skulptaĵojn por kolorigi. Unu tagon eĉ ni farbis parton de iu



masko. Dum vesperaj horoj ni helpis akvumi ananasan ĝardenon kaj nove plantitajn arbojn : bambuojn, oranĝujon kaj citronujojn. Normando plantis kernojn de mango, post kiam ni finmanĝis, kaj enterigis semojn, kiujn preparis Andrés.

Dum varmegaj horoj, kiam termometro montras +38 celsiajn gradojn, oni emas sidi kaj diskuti pri diversaj temoj restante en la ombro, en la malfermita, spaca kaj nova domo. Guido nomas ĝin la « domo de Antonio ». Arkitekto laŭprofesie, Antonio ne nur dezajnis, sed ankaŭ tute konstruis ĝin laŭ la plej moderna, kontraŭtertremma maniero, kun flosanta bazo. Tertremoj ofte okazas ĉie tra la lando, kaj tia

planko nur luligus la domon, sen ke ĝi detruigus. Impresis min tiu bela, aerplena, ligna domo el granda tektono — kies ligno tre agrablas por tia varmega klimato. Fakte, tiu regiono havas perfektan klimaton, kaj ofte oni vidas grandajn plantejojn de tiu valora arbo.

Ni babilis pri *Mojso*, la infanlibro, kiun Guido verkis kaj eldonis en kelkaj lingvoj. Li ŝatus eldoni

ĝin en pliaj lingvoj, interalie, la japana kaj araba ; mi promesis helpi por la kroata traduko. Guido diris, ke *Mojso* ne estas nur libro. Ĝi, ja, estas bela projekto, kie Esperanto servas kiel ponto-lingvo.

Pri Esperanto Guido aŭdis la unuan fojon en Moskvo de sia samlandano Carlos Salazar, sed li lernis ĝin nur post kelkaj jaroj. De tiam li partoprenis plurajn internaciajn kursojn, renkontiĝojn, kongresojn. Guido multe kunlaboras kun esperantistoj de Kubo. Kun kuba esperantisto, Alberto García Fumero, li preparis dikan latinamerikan vortaron

titolitan *Nia vortaro por latinamerikanoj : Español-esperanto — Esperanto-hispana*, kaj daŭre li havas novajn ideojn. Guido estas vera « motoro » de la Esperanta movado de Kostariko.

La familia somera domo troviĝas proksime de arbaro, kaj ĉiunokte ni povis aŭdi ne nur birdojn, najbarajn kokojn, sed ankaŭ hurlantajn simiojn.



Dum nia ekzerca duhora marŝado de la 5-a horo matene (ja estis ankoraŭ nokto, kiam ni ekmarŝis) ni povis sperti la freŝecon de la aero kaj la tagiĝon. Promenante ni vidis simiajn familiojn de tiel nomataj « kongo-j » kaj ni lernis, ke la simiinoj kaj

beboj ne hurlas. Tio estas kvazaŭ protekta tasko de viraj simioj.

Dum nia matena promeno, ni atingis iun plaĝon kaj vidis vulturojn ne nur elegante flugi, sed ili surteriĝis, kaj mallerte kaj malrapide marŝis ĉirkaŭe. Matene, multnombre venas homoj, kiuj, starante en la malprofunda

oceano, fiŝkaptas kaj donacadas al vulturoj la tro etajn kaptitajn fiŝojn. Do, la birdoj ĉiam revenas proksime por manĝi, kaj ili tute ne timas homojn. Ĉe la plaĝoj oni vidas ankaŭ brunajn pelikanojn kaj aliajn birdojn, kiujn Normando provis identigi.

Ĉiun posttagmezon ni vizitis aŭte iun apudan plaĝon, kie ni povis baniĝi en la varma Pacifiko.

Tre fama plaĝa urbeto, Samara, havis multajn turistojn kaj ĉion necesan por ili. Guido regalis nin per malvarma kokosa suko, kiun oni trinkas rekte el kokosa nukso. Dum tia varmeco ege bongustas miksita malvarma frukto-suko ! Ĝi estas vera frandaĵo, kaj Guido konis lokon, kie oni freŝe preparas fruktojn de vi elektitajn. Nun, nur pensante pri mango kaj ananaso, mi jam sentas ilian bongustecon, aromon kaj dolĉecon.

La semajno pasis, kaj ni revenis al la ĉefurbo por eniri buson al la sudo, trans la altajn montojn al la urbo San Isidro. Malgraŭ la seka sezono, la tropika pluvego surprizis nin, sed ŝajne ĉiuj estis feliĉaj, ĉar ĝi portis freŝecon. Multaj domoj kolektis pluvakvon por iom pli akvumi la ĝardenajn florojn. Tie atendis kaj bonvenigis nin Carlos, esperantisto, kiun Normando renkontis same en Kubo, antaŭ multaj jaroj.

Carlos organizis interesan dutagan programon por



ni. Ni konatiĝis kun kelkaj liaj amikoj, promenis tra malnova parto de la urbo, diskutis vigle endome pri plurlingveco kaj Esperanto, kiu, ja, estas nia familia lingvo. Tio multe surprizis ilin. Frumatene ni busis al la monto por speciala matenmanĝo ene de birde riĉa parko. Ni povis observi birdojn de

granda teraso kaj miri pro ilia proksimeco. Carlos prezentis al ni poste, ĉe kolegio, kelkajn studentojn de Esperanto-kurso kaj vizitigis al ni ekologian protektitan akvo-riĉan arbaron. Dum Carlos instruis ĉe la kolegio, lia edzino, Lucía, vizitigis al ni ilian arbareton kaj fruktejon. Ni rikoltis bongustajn oranĝojn kaj fruktojn de

anakardio. Ŝi instruis al ni kuiru konfitaĵon, premi oranĝojn por suko kaj fari *tortillas* laŭ hejma recepto. Niaj ne lertaj manoj lernis kiel frapeti farun-pilketon, tiel ke la tortiljo estu maldika kaj ronda, kaj kiel kuiru ĝin. La teknikon kiel pretigi ilin mi kunportis kanaden.



Nia reveno al la ĉefurbo kaj familio Hernández-Pridybailo similis al reveno hejmen. Estis festo. Fakte, estis la 8a de marto, tago de la virinoj. Galina preparis bongustan kukon kaj, manĝante, trinkante teon, babilante, ni pasigis la vesperon.

Nian lastan tagon ni pasigis en la urbo-centro kaj en belega muzeo pri jado kaj historio de Kostariko. La sekvan tagon ni reiris Montrealon, kaj Normando aliĝis al grupo de birdŝatantoj el Kebekio kaj plu vojaĝis dum du pliaj semajnoj.

Veninte hejmen, mi bone memoras Kostarikon kaj proksimigas ĝin al familianoj kaj geamikoj per tipaj manĝoj, kiujn ni ŝatis : fazeolo kun rizo laŭ kostarika maniero nomata *gallo pinto*, kuirbanano, kun aldono de ovaĵo, fiŝaĵo aŭ kokaĵo.

Kompreneble, koriandro nepre necesas, por ke la gusto estu tipa. Tia kutima manĝo sur telero nomiĝas *casado*. Post la manĝo mi servas ruĝan teon el « floro de Jamajko », kiun donacis al mi Galina ; ĝi estas trinkaĵo acideta, saniga kaj vitaminplena.

Estas certe, ke, dum ni manĝas ĉi tie kaj rakontas pri niaj spertoj en Kostariko al nordanoj, niaj pensoj kaj dankemaj sentoj ĉiam reiras suden al niaj geamikoj. Adiaŭante niajn geamikojn, niajn gastigantojn, ni promesis unuj al la aliaj, ke ni denove renkontiĝos. Kompreneble, ni ne scias nun kiam kaj kie...

Vere, nia amikeco norde-sude havas sian ĉarmon.

Malpli oftaj fundamentaj vortoj 5

Francisko Lorrain

Iam kaj tiam oni renkontas fundamentan radikon, kiun oni povus pli ofte uzi. Jen la kvina ero de kroniko prezentanta ĉiufoje kelkajn malpli ofte uzatajn fundamentajn radikojn. La difinoj kaj ekzemploj estas ĉerpitaj el La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto (Paris, Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu markas ĉiujn fundamentajn vortojn per stelo ★. Komentoj miaj aperas inter rektaj krampoj []. Alta ^Z indikas zamenhofan citaĵon aŭ vorton, alta ^B citaĵon de K. Bein (« Kabe »), alta ^X citaĵon el la Hebrea Biblio (Malnova Testamento) laŭ la Londona eldono.

★ **brog/i** (tr) **1** Trempi en, aŭ surverŝi per bolanta akvo : *~i kokidon, por pli facile ĝin senplumigi.* ☞ *infuzi.* **2** Ĵeti en bolantan akvon viandon aŭ legomojn, por ilin pretigi al posta kuirado aŭ depreni de ili ian akrecon : *~i brasikon, bovidlangon.* **3** Brulvundi per tre varma likvo : *propra supo ~as, fremda allogas^Z ; ~ita eĉ sur (malvarman) akvon blovas^Z ; (f) drinkulo, kiu ~is al si la intestojn^B ; plenda sento kontraŭ la*

homoj aliformiĝis en ~antan bolaĵon^Z. **~aĵo.** Akvo, en kiu oni bolkuiris viandon : *li pretigis kapridon, la viandon li metis en korbon k la ~aĵon li enverŝis en poton^X.* ☞ *buljono.*

★ **buk/o.** Metala kadreto kun movebla pinglo, por fiksi zonon, partojn de vesto, de ŝuo ktp. [Ekzistas ankaŭ alitipaj bukoj.] ☞ *agrafo, broĉo.* **~i** (tr) Fiksfermi per ~o : *~i la rimenon de tornistro.* **dis~i, mal~i** (tr) Malfermi, malfiksante la ~on : *dis~i (zonon) pli vaste^Z.*

★ **bulk/o.** Malgranda bakaĵo el delikata faruno (precipe tritika) : *buter~o* (SIN. brioĉo) ; *suker~o* ; *korna (lunarka) ~o* [france, « croissant »] ; *spirala ~o kun sekvinberoj* [en Kebekio « roulé aux raisins », en Francujo « pain aux raisins »]. **~aĵo.** Malfreŝa ~o aŭ pano, trempita en lakto kaj fritita ĝisbrune. ☞ *pankuko.* **kolbaso~o.** Brogita kolbaso kun mustardo ŝovita tra ~o.

Sur la bildoj: buko, zonbukoj, bulko, spirala bulko, korna bulko



AMU Poznanon daŭras en 2016-17 !

Antaŭ du jaroj ESF lanĉis kampanjon « AMU Poznanon » por trovi aldonan financadon por Interlingvistikaj Studoj en Poznano (Pollando) ĉe la Universitato Adam Mickiewicz UAM, aŭ AMU. ESF jam de jaroj subtenas la studentojn de la trijara postdiploma programo en la prestiĝa kaj dua plej granda universitato de Pollando, kaj la celo de AMU Poznanon estis kolekti, kun la helpo de esperantistoj, aldonajn 5 mil usonajn dolarojn por tiu unika programo. La pasintaj du kampanjoj estis sukcesaj : ĝi atingis la deziratan celon dank' al malavaraj kontribuoj de multaj esperantistoj, kaj ni ĝojas anonci, ke la ESF-estraro decidis daŭrigi AMU Poznanon ankaŭ por la studjaro 2016-2017, kun la sama ambicia celo : kolekti aldonajn 5 mil dolarojn por la programo.

AMU Poznanon funkcias simple : ĉiu donaco al tiu ĉi programo estas duobligata de ESF, ĝis la sumo de 2500 dolaroj, tiel ke la Interlingvistikaj Studoj povu ricevi la sumon de \$5000, aldone al la regula subteno de ESF, por la kresko de la programo. AMU Poznanon estis lanĉita en bona momento, ĉar la lasta grupo de gestudentoj estis multe pli granda ol kutime, kio postulas pli grandan subtenon al la studentoj ol en la pasinteco. Multaj studentoj venas el neriĉaj landoj, kelkaj devas veturi grandajn distancojn por veni al

Poznano por la du ĉeestaj sesioj kaj la ekzamenoj ĉiujare, kaj pro tio la aldona helpo de esperantistoj kaj ESF estas aparte aprezata.

Ĉi-aŭtune, komence de la tria jaro por la studentoj de la grupo 2014-2017, aparte bunta pro la koincido de la aŭtuna sesio ĉe AMU kun la kultura festivalo Arkones, ESF denove invitas la esperantistojn kontribui ĉu al la programo AMU Poznanon aŭ fari ĝeneralan donacon al ESF por helpi financi la ekzistantajn projektojn, subtenatajn de ESF, kiel Lernu.net kaj Edukado.net, kaj por povi investi en novajn promesplenajn iniciatojn. Se interlingvistikaj studoj interesas vin, pripensu aliĝi al la sekva grupo : 2017-2020! Koran dankon al la [ĝisnunaj subtenantoj de tiu ĉi programo](#), kaj koran antaŭdankon al niaj estontaj donacantoj!

Fari donacon al AMU Poznanon :

- Rete: <http://esperantic.org/amu>
- Per UEA: la konto **esfo-p**, bv. skribi al financoj@co.uea.org, kopie al admin@esperantic.org, petante fari la ĝiron, kaj kun la noto Por « AMU Poznanon »

Pli da informoj pri Interlingvistikaj Studoj:

- Ĝenerale: www.amu.edu.pl/~interl/
- Pri la lasta sesio: <http://edukado.net/novajhoj?id=647>

Se ne internacia lingvo, kial ne internacia skribo ?

Silvano la Lacerto Auclair

Ceux parmi vous qui s'intéressent à l'histoire de l'idée de langue internationale se rappelleront peut-être qu'avant de créer le volapük, en 1878, l'abbé Schleyer avait d'abord mis au point une écriture universelle. Évidemment, on fait aujourd'hui beaucoup mieux.

Konsideru la literon J. Laŭ la lingvoj, ĝi povas elparoliĝi kiel J, Ĵ, Ĝ aŭ Ĥ. Imagu la konfuzon de fremdulo, kiu penas prononci la francan nomfinaĵon *-eault*, kaj iam ekscias, ke ĝin oni elparolas... o. Imagu najbarajn hindajn lingvojn, sone tre similajn, sed kun tute malsamaj alfabetoj (eĉ se ili aspektas simile al ni).

Tiuj problemoj estas evidentaj al ĉiuj, kaj oni emas solvi ilin proponante iajn universalajn alfabetojn. Mi hodiaŭ prezentos al vi tri el ili.

Internacia fonetika alfabeto

Ni unue honoru tiun, kiu meritas honoron, nome la **internacian fonetikan alfabeton** (IFA). Baze, tiu alfabeto uziĝas por skribi lingvojn, kiuj ne havas skribmanieron, kaj ankaŭ por priskribi la prononcon de vortoj en fremdaj lingvoj, ekzemple dum instruado. Kun diversaj niveloj da precizeco, oni tute bone povus uzi ĝin kiel universalan

skribon. Tamen, du bazaj obstakloj. Unue, tiuj niveloj da precizeco : neniue facile scios, kiun nivelon uzi. Ni konsciu, ke per IFA eblas distingi la diversajn kebekiajn akĉentojn ! Tio baldaŭ iĝus ĥaosa. Due, IFA estas tre malbela : ĝi estas miksaĵo de latinaj kaj grekaj literoj, plus nove kreitaj simboloj. Ĝi tre taŭgas por scienco, sed ne por ĉiutaga uzo. /tʃu.vi.nɛ.samɔpi'ni:.asɪ/

Ŝŭa ʃʊa

Alia sistemo, kiun mi renkontis antaŭnelonge, nomiĝas Ŝŭa (angle : shwa). Ĝi estas tre kompleta sistemo, per kiu verŝajne eblas skribi ĉiujn lingvojn de la mondo. Entute, ĝi enhavas 165 simbolojn, inkl. simbolojn por longigi, palataligi aŭ nazaligi sonojn. La simboloj estas, laŭdire, facile ellerneblaj, ĉar iliaj formoj baziĝas sur la manieroj, laŭ kiuj la sonoj estas produktataj en la buŝo kaj

Interbet

Alia interesa sistemo estas *Interbet*, por **Internacia alfabeto**. Ĝi bazigas sur la fakto, ke skribi *ĉiujn lingvojn* sendube postulus grandegan aron da literoj, sed ke skribi *ĉiun lingvon* bezonas multe malpli, ĉar neniu lingvo uzas ĉiujn sonojn. La aŭtoro, Vitaly Vitaŝ, simple kreis 45-literan alfabeton, bazitan sur la literoj de la latina alfabeto, sed kun po unu aŭ du aldonaj literoj por *aliaj sonoj*. Esplorante la alfabeton, oni tuj rekonas, kiujn literojn Esperanto uzus por ĉ (cirila litero), ĝ, ĵ, ĥ, ŝ (alia cirila litero) kaj ŭ. Kontraŭe al kio okazus por Ŝŭa, oni ne devas cerbumi, kiun literon uzi por O aŭ E... Krom la jenaj literoj, ekzistas kelkaj kromsignoj, ekzemple por tonoj.

Pli da informoj :

<http://shwa.org/>

http://www.astrolingua.ru/ENGLISH/inter_eng.htm

Aa	Λα	Bb	Бб	Cc
<small>ALFA (A)</small>	<small>AN (A>O>A, A, >O)</small>	<small>BETA (B)</small>	<small>BUKI (B>B, Be # gh)</small>	<small>TSOL (T, C, S)</small>
Dd	Ɖɖ	Əə	Ee	Σε
<small>DELTA (D)</small>	<small>DORN (D>C, D)</small>	<small>EVI (E>ə, E, 'a)</small>	<small>EGI (E, É, 'e)</small>	<small>EZA (E>ə, É, E, 'a)</small>
Ff	Γγ	Ĥĥ	Hh	Ĥĥ
<small>FAU (F)</small>	<small>GALL (G)</small>	<small>GEEN (G>G, Y, G)</small>	<small>HADE (H)</small>	<small>HETUMPHK (H>H, Y, G, G)</small>
Ii	Ĵĵ	Ĵĵ	Kk	Xx
<small>IDI (I)</small>	<small>DJOTA (J, Z)</small>	<small>ZHEU (Z)</small>	<small>KEYP (K)</small>	<small>HEHE (X, G, H)</small>
Ll	Mm	Nn	Ŋŋ	Oo
<small>LIMA (L)</small>	<small>MEM (M)</small>	<small>NUN (N)</small>	<small>NONG (N, G)</small>	<small>OYNA (O, G)</small>
Θθ	Pp	Φφ	Чч	Шш
<small>YONE (G>B, G)</small>	<small>PIT (P)</small>	<small>FUT (P>F, G, G, G, G)</small>	<small>CHAD (C)</small>	<small>SHIN (S)</small>
Ϟϟ	ƆƟ	Яя	Rr	Ss
<small>HAKS (T, T)</small>	<small>KOF (G, G, G)</small>	<small>YARO (R>R, L, R, R)</small>	<small>RESS (R)</small>	<small>SIGMA (S)</small>
Tt	ƧƧ	Uu	Уу	ƷƷ
<small>TAP (T)</small>	<small>TEFA (T>G, G, G)</small>	<small>UNA (U)</small>	<small>YULLA (U>U, Y, G)</small>	<small>HRDU (U>U, G, G, G, G)</small>
Yy	Vv	Ww	Zz	ƷƷ
<small>YOF (U, G)</small>	<small>VITA (V)</small>	<small>VAN (W, G, G)</small>	<small>ZET (Z)</small>	<small>OZEMA (G, G, G)</small>

Ponto de Vortoj

Ponto de Vortoj estas la nova libro de Esther Schor, konata esperantisto, estrarano de ESF, profesoro de Princeton kaj rekonita aŭtoro (interalie, la aŭtoro de *Emma Lazarus*). *Ponto de vortoj* estas riĉa kaj pasia biografio de nia lingvo kaj ĝia revo de harmonio kaj paco por la mondo. Ekde ĝia apero komence de oktobro, la libro ricevis elstarajn recenzojn rete kaj en konataj ĵurnaloj. La libro aĉeteblas papere kaj elektronike de Amazon kaj pluraj aliaj librovendejoj.


Recenzoj (angle) :

lareviewofbooks.org/article/esperanto-language-of-hope-esther-schors-bridge-of-words/

www.goodreads.com/book/show/23847913-bridge-of-words

Video :

youtube.com/watch?v=KzCYfUWdFcA





Esperanto-renkontiĝoj



20 — 22-a de majo 2017 : 14-a MEKARO

Hamiltono, Ontario

22 — 29-a de julio 2017: UK

Seulo, Koreio

5 — 12-a de aŭgusto 2017 : IJK

Aneho, Togolando

7 — 9a de oktobro 2017 : ARE

Silver Bay, NY

Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo, 14-a de oktobro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 28-a de oktobro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis (**jarkunveno!**)

Vendredo, 11-a de novembro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 25-a de novembro, 2016, ĉe Resto Végo St-Denis

Sabato, 17-a de decembro 2016, ĉe Resto Végo St-Denis: Zamenhof-festo / Jarfina festo

Vendredo, 13-a de januaro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 27-a de januaro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 10-a de februaro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis

Vendredo, 24-a de februaro 2017, ĉe Resto Végo St-Denis

* Noto : manĝo je la 18 h, babilado ekde 19:30 h. Pli pri la horaro : ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>. **Resto Végo St-Denis (restaurant végétarien)** : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »).

Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafiko : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain kaj Joel Amis. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain et Joel Amis. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2016.12.20
3-3791, av. Linton • Montréal • H3S 1T3 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

Vizitu nian retejon !
Visitez notre site web !
www.esperanto.qc.ca

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :
www.pasportaservo.org.
Vi povas ankaŭ kontakti Ĵenja-n Amis (yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

